
La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-08-12 n-ro 261

# Vivo povas ekesti sur unu el lunoj de Saturno



Korvoj scias strategie agadi tiom bone kiom ĉimpanzoj

Aparta laborposteno allogas 100 mil kandidatojn

Sekreto de kontentaj paroj: 10 kondutoj, kiujn vi devus imiti!

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Barato: Sciencistoj manifestacias kontraŭ pseŭdo-scienco, religia netoleremo kaj bagatelaj financoj
*Miloj da instruistoj kaj studentoj defiladis en dudeko da urboj p. 03*

EU decidis intensigi sankciojn kontraŭ KDPR laŭ rezolucio de UN
*Severaj sankcioj p. 04*

Aparta laborposteno allogas 100 mil kandidatojn
*La malneta salajro estos 100 mil realoj (preskaŭ 27 mil eŭroj) p. 04*

Vivo povas ekesti sur unu el lunoj de Saturno
*Komplikan molekulon en atmosfero de Titano p. 05*

Korvoj scias strategie agadi tiom bone kiom ĉimpanzoj
*Inteligenteco evoluis sendepende de filogenetikaj rilatoj kun homoj p. 06*

Sekreto de kontentaj paroj: 10 kondutoj, kiujn vi devus imiti!
*Kiu miraklo faras partnerecon feliĉa? p. 07*

Hodiaŭe
*Jacinto Benavente; Thor Vilhjálmsson; kaj Kanalo p. 09*

# Barato: Sciencistoj manifestacias kontraŭ pseŭdo-scienco, religia netoleremo kaj bagatelaj financoj

Ĉi-merkredon [09 aŭg 2017] okazis en Barato Marŝado de la scienco. Simila mobilizado jam okazis en aprilo en la tuta mondo, alvoke de usonaj universitatanoj, maltrankvilaj pro la dogmemaj tendencoj de la administrado TRUMP. Ĉi-foje, la movado komenciĝis en Barato, kie miloj da instruistoj kaj studentoj defiladis en dudeko da urboj de la lando. Ilia celo estis protestado kontraŭ kreskanta promocio, fare de la registaro, de religiaj hinduaj mitoj, por senkreditigi la historiajn aŭ sciencajn verojn.




En kvazaŭ-funebra defilado, ĉirkaŭ 200 esploristoj defiladis en la centro de Nov-Delhio. Ĉiuj decuncis, per multkoloraj afiŝtabuloj, la forpason de la sciencisma spirito, fronte al la religiaj superstiĉoj.

Sumitro BANERJEE estas profesoro en esplor-instituto de Kalkuto, kaj kun-organizanto de tiu marŝado de la scienco: «Antaŭ du jaroj, iu povis prezenti tezon ĉe la Barata Scienca kongreso, asertante ke 9 000 jarojn antaŭe, en Barato ekzistis aviadiloj, kiuj kapablas vojaĝi de planedo al planedo. Li prezentis neniun pruvon, nur opinion. Aliaj personoj asertas, ke la mitologio de Ramajano rakontas historiajn faktojn. Tio maltrankviligas nin, ĉar tiuj tezoj ricevas la subtenon de la registaro, dum ili ne havas sciencajn bazojn».

La Ĉefministro Narendra MODI mem, estas hindua fundamentismulo, kaj jam subtenis tiun specon de tezoj. Publika mono ekzemple estas nun dediĉita al esploroj pri bonefiko de la fekaĵo de la sankta bovino.

Sed por la studentoj pri bioteknologia tezo, kiel Asim CHAPRAKAR, mankas rimedoj: «La financoj malkreskas, niaj instrumentoj ne estas regule riparitaj. La laboro, kiu postulis de ni semajnon, postulas nun du aŭ tri monatojn. Tio damaĝas la esploradon de ĉiuj».

Neniam Milito Inter Ni

# EU decidis intensigi sankciojn kontraŭ KDPR laŭ rezolucio de UN

La Eŭropa Komisiono ĵaŭde [10 aŭg 2017] decidis intensigi sankciojn kontraŭ la Korea Demokratia Popola Respubliko laŭ la rezolucio 2371 de la Sekureca Konsilio de la Unuiĝintaj Nacioj. Naŭ individuoj, kaj kvar entoj de la KDPR, inkluzive de nacia banko, estis enigitaj en la nigran liston de sankcioj.



La nigra listo celas limigi la eniron kaj eliron de tiuj individuoj en kaj el la EU kaj frostigi aktivojn de tiuj individuoj kaj entoj en la EU. Laŭ la rezolucio de la Sekureca Konsilio, 62 individuoj kaj 50 entoj estis enskribitaj en la nigran liston, kaj la EU decidis aldoni 41 individuojn kaj 7 entojn en la liston.

La 5an de aŭgusto, la Sekureca Konsilio de la UN unuanime adoptis Rezolucion 2371, severe kondamnantan la provpafojn de interkontinentaj balistaj misiloj de la KDPR respektive en la 4a kaj 28a de julio. La konsilio postulis, ke la KDPR rezignu nuklearmilan kaj misilan planojn, kaj decidis enkonduki pli severajn sankciojn kontraŭ la lando.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Aparta laborposteno allogas 100 mil kandidatojn

Ununura posteno cele al aparta misio por la firmao *"SerasaConsumidor"* furoras en Brazilo, kaj ĝi jam ricevis 100 mil aliĝpetojn pere de la retejo "*O emprego dos sonhos*" (La revata dungado), kies limdato por kandidatiĝoj finiĝos je la horo 23:59 de la venonta dimanĉo, la 13-a de aŭgusto.



La kontraktota kandidato havos kiel mision veturi tra 40 brazilaj urboj, raporti pri la financa vivo de la homoj, kiujn li trovos en tiu vojaĝado, kaj diskonigi tiujn historiojn en la sociaj retoj (tekste, bilde, videe).

Por la tuta sezono (de la 4-a de septembro 2017 ĝis la 31-a de aŭgusto 2018) la malneta salajro estos 100 mil realoj (preskaŭ 27 mil eŭroj), kaj krome avantaĵoj estos pagitaj de la firmao, kiel transportado, gastigado, nutrado kaj malsanokosta asekuro.


La alvokitoj por la dua fazo, devos krei 45-sekundan filmeton pri financa klerigado kaj publikigi ĝin en la retejo de la projekto. Ili trapasos balotadon ĝis la 19-an de aŭgusto, kiam la homoj povos voĉdoni laŭ siaj preferoj.

La 10 partoprenantoj kun pli da voĉdonoj, krom kvin elektitaj de teamo de la firmao, tiuj trapasos al la fina etapo, kiu konsistas el skajpa intervjuo. La kontraktota venkinto estos anoncita je la 25-a de aŭgusto.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# Vivo povas ekesti sur unu el lunoj de Saturno

Ĉu Titano, unu el Saturnaj lunoj, estos la sekva objekto, kiun homoj strebos atingi post Marso? Eble jes, ĉar laŭ novaj esploroj, publikigitaj en la eldono *Science Advances*, esploristoj trovis komplikan molekulon en atmosfero de Titano, kiu efike povas gvidi al estiĝo de vivo.



La trovita substanco estas vinilcianido kaj esploristoj opinias, ke tio povas esti ŝlosilo al formiĝado de ĉelaj membranoj en la medio de Titano. Malsame al tiu de la Tero, la atmosfero de Titano estas ekstreme malvarma. Rezulte la membranoj ne povas ekesti kiel tio okazis sur nia planedo. Tamen vinilcianido miksita kun likva metano, trovebla en lagoj sur Titano, povas kontribui estiĝon de tiaj ĉi membranoj.

La malkovro estas farita de spavo [senpilota avio] de la aparato *Kassini* [*Cassini*], kiu esploris Saturnon jam dum 13 jaroj. Laŭ informo de la eldonaĵo *The Verge* [Rando], la substanco estis trovita jam antaŭe, sed la spavo ne povis sendi mezureblajn datenojn. Por preteriri la baron esploristoj uzis datenojn, kolektitajn per radioteleskopoj en Atakamo, Ĉilio. Sciencistoj tiam legis radiajn ondojn, kiujn ellasas diversaj tipoj de atmosferoj kaj eksciis, ke sur Titano ankaŭ fojfoje okazas pluvoj. Certe tio ne estas akvo, sed likva metano. Surbaze de tio estis farita konkludo, ke ekzistas granda ebleco, ke vinilcianido ankaŭ troveblas en metanaj lagoj de Titano.

Dume ne estas pruvoj de ekzisto de membranaj ĉelaj strukturoj sur Titano, sed esploristoj malkovris minimume, ke eblas estiĝo de vivo sur la Saturna luno. Rezulte sciencistoj estas inspiritaj daŭrigi esploradon.

Martin KORDINER [*CORDINER*], kunaŭtoro de la esploro, diris, ke "Tio ĉi ankoraŭ estas nur malforta esperigo pri ekzisto de vivo sur Titano kaj pri baza ĉela vivospeco. Sed tio donas al ni lanĉpunkton en tiu ĉi pridiskuto. Se vere estas vivo en oceanoj de Titano, do vinilcianido povas esti ĝia komponanto."

Kirill NOVIĈENKO
Interalie

# Korvoj scias strategie agadi tiom bone kiom ĉimpanzoj

Vi certe jam spektis filmon pri ruzaj birdoj kiuj sukcesas malfermi botelon kaj aliajn malfacilajn aranĝojn por ekhavi al si manĝaĵon. Kvankam tiuj videoj estas ofte amuzaj, ili kaŝas gravajn sciencajn supozojn pri animala inteligenteco, kaj konsekvence pri la nia.



Inteligenteco estas malfacila por mezuri inter homoj, kaj ne pli facila por agnoski en animaloj. Kelkaj kondutoj povas ŝajni sufiĉe inteligentaj kaj eĉ surprizigaj, sed post analiza observado ĝi fariĝas malpli kompleksa ol la supraĵa unua rigardo. Tial, sciencistoj ade provas distingi la veran inteligentecan kapablon de tiuj nur intuiciaj aŭ instinktaj. Multaj el tiuj eksperimentoj oni faras kun ĉimpanzoj, bonoboj [etaj ĉimpanzoj] kaj goriloj, kiuj ofte estas konsiderataj la plej similaj al la homa specio. Pro tio, diversaj sciencistoj kredas, ke la inteligenteco simila al tiuj de homoj certe troviĝas nur en tiuj bestoj filogenetike proksimaj, kiel la ceteraj primatoj.

Ŝajne tio ne plu estas tiom evidenta.

Sciencistoj el Svedio montris, per kelkaj eksperimentoj, ke korvoj (*Corvus corax*) kapablas elmontri kompleksan inteligentecon, nur komparebla al tiuj de ĉimpanzoj kaj aliaj proksimaj primatoj. Ili celis kalkuli, ĉu korvoj elmontras kapablon observi cirkonstancon kun perspektivo de estontaj rezultoj, kaj plani ĝustan agon por atingi tiun celon. La rezulton ili publikigis en la prestiĝa scienca revuo *Science*.

Dekomence, la sciencistoj montris al korvoj ke, metante specifan objekton interne de skatolo per truo, eblas ekhavi al si bongustan nutraĵon. Iom da tempo post tiu sperto, la sciencistoj oferis al la korvoj pleton kun diversaj objektoj, inter tiuj la specifa por malfermi la skatolon. La plejmulto el ili elektis al si la specifan ilon. En variaĵoj de tiu eksperimento, la sciencistoj oferis pleton kun aliaj objektoj kaj la korvoj elektis iun hazarde. Sed kiam alia pleto estis oferita kun aliaj malsimilaj objektoj – inklude la specifan ilon – la korvoj anstataŭis la unuan per la specifa ilo.

En la dua parto de la eksperimento, la sciencistoj oferis pleton kun diversaj iloj – inklude la specifan por malfermi la skatolon – kaj nutraĵon, malpli bongustan ol tiu interne de la skatolo. La korvoj elektis la ilon. Tiu rezulto montras, ke korvoj povas ne agi impete rekte al la manĝaĵo, sed fari elekton por ekhavi al si pli bonan nutraĵon en ebla estonteco.

La sciencistoj miris antaŭ tiu kapablo plani estontecon, en simpla eksperimento kiu estas sufiĉe malfacila por esti ne solvebla de malgrandaj simioj, supozeble pli inteligentaj. Tio montras, ke tiu nivelo de inteligenteco evoluis sendepende de filogenetikaj rilatoj kun homoj, kaj tio certe malfermas gravajn perspektivojn por estontaj esploroj kun aliaj animaloj.

Fonto: *Can Kabadayi kaj Mathias Osvath. 2017. Ravens parallel great apes in flexible planning for tool-use and bartering. Science, 357(6347):202-204*

Wendel Teles Pontes
ISAE

# Sekreto de kontentaj paroj: 10 kondutoj, kiujn vi devus imiti!

Kiu miraklo faras partnerecon feliĉa? Kio kaŝiĝas malantaŭ la reale funkciantaj rilatoj, kiuj daŭras jarojn kaj ambaŭ el la geparo estas ene kontentaj? Konsiloj estas multaj, sed kion la amanta paro vere faras? Eble tiujn ĉi dek kondutojn.



Kiam du homoj vivas kune, estas klare, ke ili travivas kaj momentojn feliĉajn kaj malagrablajn. Kiam ili vere bone kunrilatas, tiujn pezajn momentojn ili komune superas. Kiel distingi vere kontentigan partnerecon kaj geedzecon? Feliĉaj homoj kunfaras jenajn dek kondutojn:

1. Ili komune en- kaj el-litiĝas

Unu enlitiĝas je la naŭa vespere kaj la dua viglas ĝis la tria matene? Certe ne. Kontentaj paroj havas similan bioritmon kaj enlitiĝas je la sama tempo la plejparton de la tagoj. Same matene ili vekiĝas.

Tio ne ŝajnas tiel grava, sed komuna dormiĝado kaj vekiĝado en la lito kaj la komuna matenmanĝo faras miraklojn. Plue – ĉar ili havas similan bioritmon, ili pasigas la plejparton de la tagoj vere kune (ne ke unu la duonon tradormu) kaj regas grandŝanco, ke amoremon ili sentos en la simila tempo.

Kiam unu maldormas kaj la alia dormas, restas malpli da tempo por babili kaj seksumi.

2. Ili komune rememoras

Ili havas komunajn travivaĵojn, kiujn ili ŝatas rememori. Rigardante albumon de fotoj ili ridas, kiel stulte ili kombis sin, kiam ili ekkonis unu la alian, kiam ili perdis valizojn libertempe en Turkio kaj kiel ili misvojis dum bicikla ekskurso.

Ili rememoras momentojn travivitajn kune, ankaŭ senkonscie eĉ tion, kion ili jam travivis, kion ili komune sukcesis, superis.

3. Ili tuŝas unu la alian

Temas ne pri amorado, sed pri tiuj malgrandaj tuŝoj, kiuj signifas ununuron: mi amas vin! Temas pri malgrandaj brakumoj, adiaŭa kiso, mantenado, karesado, kiam oni sidiĝas unu apud la alia sur divano kaj spektas filmon.

4. Ili ridas pri la alia, ankaŭ pri si mem

Ankaŭ post jaroj de la komuna vivo ili scipovas plenridi unu pri la alia. Ili havas similan humorsenton kaj sukcesas moki unu la alian. Ili ne dubas pri sia amo, tiel la ŝerco de partnero ridigas ilin, ne ofendas.

5. Ili scipovas vivi sen moderna tekniko

Kiam ili estas kune kaj tio eblas, ili forĵetas la poŝtelefonojn kaj poŝkomputilojn. Se ili komune vespermanĝas, ili ne rigardas la poŝtelefonon, sed ili babilas. Libertempe ili ne bezonas meti fotojn al socia reto, ili ne havas tempon por tio, ĉar ili dediĉas sin unu al la alia. Kiam ili revenas el laborejo, ili ne sidiĝas ĉe la komputilo por kontroli siajn retaĵojn, sed ili parolas pri la tago kaj unu al la alia.

6. Ili komune tediĝas

Estas facile travivi aktivajn momentojn, sed kiel travivi ĉiutagan tempon, kiu ofte estas simila tagon post tago? Multaj devoj kaj neniu ekzalto. Se du personoj bone kunrilatiĝas, ili sukcesas eĉ enui komune.
Dum tiuj grizaj tagoj ili kapablas superi grizecon – aŭ per bona vespermanĝo, kiun ili komune kuiras, aŭ per bela filmo, kiun ili spektas.
Al la kontentaj paroj sufiĉas esti nur kune, ili ne bezonas deliri, sin distri aŭ „terure feliĉiĝi“.

7. Ili manĝas kune

minimume unufoje tage ili trovas tempon por kune sidiĝi kaj manĝi. Ne gravas, ĉu ili maten-, tag- aŭ vespermanĝas. Sed ili kundividas tiun momenton. Nepre ili ne pripensos, ke unu manĝos ĉe la televidilo kaj alia ekzemple ĉe la komputilo.

8. Ili surprizas unu la alian

Ne temas pri megalomania libertempo en la Kariba Maro, plenriĉe sufiĉas etaj diversaĵoj. Ekzemple se ili intencas halti en vendejo por aĉeti – por vivkunulo - ŝatatan fiŝon, kiun ili komune preparos por vespermanĝo.

9. ili havas komunajn projektojn


pri io ajn, de planoj de vojaĝo, ĝis konstruado de domo, kreado de firmao aŭ edukado de infanoj. Simple ili pripensas ion, kio estas komuna, kio superas iliajn ĉiutagaĵojn kaj persistas dum longa tempo. Io, kio ligas ilin longdaŭre, kio meritas investojn, tempon, energion kaj pri kio ili fieras.

10. Ili sukcesas esti solaj

Egale, ĉu libertempo, kiun ĝuas kunulo kun amikoj, aŭ kuracrestado kun amikinoj, aŭ simple semajnfino, kiu separas unun de la alia dum laborvojaĝo – kontentaj paroj kredas al si, ne suspektas la alian, ili ne pensas, ke la alia farus iun „fiaĵon“.

Do, ĉu vi faras minimume iun el tiuj ĉi dek kondutoj?

Jaroslava Malá
Esperanta Retradio




## Jacinto BENAVENTE

**La hispana verkisto Jacinto BENAVENTE [ĥasinto benavente] naskiĝis je la 12-a de aŭgusto 1866 en Madrido kaj mortis tie je la 14-a de julio 1954. En la jaro 1922 li gajnis la Nobel-premion pri literaturo.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**

## Thor VILHJÁLMSSON



**Thor VILHJÁLMSSON, naskiĝis la 12-an de aŭgusto 1925 en Skotlando, forpasis la 2-an de marto 2011, estas unu el la plej rimarkindaj verkistoj islandaj en la dua duono de la 20-a jarcento.**

**En Esperanto aperis: *Rido inter arboj*.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Kanalo *Dortmund-Ems*, Germanio.**

**Vikipedio**